 Tiam iru, kien vi deziros.

Kiam turko al pordego venis,
 Jus la lasta stelo malaperis:
 Estis tiu stel' de Ĉengić-aga.

Ĝin bekas kaj ĵetas, rigardas al mi,
 Kvazaŭe meditus ĝi kune kun mi.
 Liberaj do birdoj forflugu ni tuj
 Al montoj neĝblankaj, al mia patruj',
 Al landoj liberaj ĉe blua la mar',
 Kie regas nur mi kaj senhalta ventar'.
 Esperantigis: R. J. Elleder.

LA VIKTIMO DE L' DESTINO.

Emil Marriot.

Kiam li naskiĝis, la diino de l' sorto estis ĵus en malbona humoro; kaj ŝi
 transdonis la mizeran, malgrandan hometon, kiu al ŝi ne plaĉis, al la protekto de
 koboldo, kies nesatigebla malico estis lia plej distinga eco.

»Kio fariĝos el tiu ĉi homo?« demandis la koboldo.

⁸⁾ Hajdukoj oni tiampe nomis homojn, kiuj pro iu al ili de turkoj farita
 maljusteco aŭ perforto foriris en montajn arbarojn kaj de tie, dezirante sin venĝi
 sur turkoj, atakadis ilin. ¹⁾ Kavaz, servisto de altrangulo. ²⁾ Jatagaĵn malgranda
 turbigita glavo, orienta armilo ³⁾ Struko, orienta tuko, kiun oni uzas kiel su-
 servesto; vidu la apudan bildon. ⁴⁾ opanak, balkana piedvesto. ⁵⁾ rakĉin,
 turka kapkovrilo. ⁶⁾ Saruk, ŝtofo, kiun turkoj ĉirkaŭ rakĉin volvas. ⁷⁾ ⁸⁾ kaj ⁹⁾ Lokoj
 en Montenegro. ¹⁰⁾ Cetinje, la ĉefurbo de Montenegro.

»Poeto«, respondis la diino. »Ĉio alia estu al vi lasita«.

La koboldo frotis la manojn pro granda kontenteco. Malmultaj estaĵoj havas feliĉon kaj favoran stelon en la vivo, kaj bonŝanceloj kaj feliĉuloj ĉiam malofte troviĝis. Tamen ekzistas viktimoj de l' destino, super kiuj ĝi ŝajnas pendi, kvazaŭ malbeno, plej ofte impresmaj kaj timemaj animoj, kiuj maltrankvile kaj nekompreneble la mondon, vagas tra la vivo, kiuj ĉien venas tro frue aŭ tro malfrue, al kiuj ĉio malprosperas kaj kiuj neniam spertas, kio signifas esti feliĉa. Ili estas notitaj de la destino, kaj koboldo observas iliajn paŝojn kaj zorgas senlace por ĉion al ili difekti: ĉiun entreprenon, ĉiun gojon.

La poeto-infano en sia lulilo naskiĝis en tia malbona horo kaj la diino de l' destino notis lin. Li estis destinata kiel viktimo de l' sorto kaj la koboldo frotis malice la manojn kaj gojis, ke li havas novan akiraĵon.

La poeto ne sciis pri tio kaj komencis sian vivon plena de espero kaj atendo, kiel aliaj, kiel ĉiuj homoj faras. Li sopiris pri patrina amo, kaj ne havis patrinon: ŝi mortis, kiam ŝi donacis al li la vivon: li havis duonpatrinon kaj malbonajn duongefratojn, kiuj al li maldolĉigis la infanecon. Li estis malriĉa kaj devis jam frue zorgi pri la ĉiutaga pano. Sed li estis juna, lia nervoforto ankoraŭ ne eluzita kaj tiel li batalis kaj esperis ankoraŭ ne antaŭsentante, ke tio estas vane, ke li estis notita.

Li antaŭiris siajn samtempulojn kaj kreis verkojn, kiuj estus elvokintaj sensacion, se la koboldo ne estus maldorminta kaj insidinta. Sed la koboldo, kiu neniam ripozis, blindigis la samtempulojn de l' poeto kaj tiamaniere la juna poeto ne trovis rekonon kaj restis malriĉa kaj nekonata. — Post dek jaroj aperis aliaj, kiuj, konscie aŭ senkonscie, migradis sur liaj postesignoj kaj ripetadis tion, kion li jam antaŭ dek jaroj diris: nur pli bone ol ili. Kaj tiuj ĉi aliaj, kiuj ne aperis solaj, kiel li, sed en potenca amaso, kiuj trumpetanancis siajn ideojn, faris teruran bruon kaj helpis unuj al la aliaj per reciproka laŭtega laŭdo: tiuj ĉi aliaj estis aŭskultataj, laŭdegataj kaj fariĝis famaj dum unu nokto. Kaj li, la unua, la vojtrovinto, estis forgesita, antaŭ ol oni lin rimarkis.

Li komencis jam ŝanceliĝi kaj lia forto estis jam duone eluzita. Sed li batalis ankoraŭ konstante. Estis ja neeble, ke al li, ĵus al li, estu rifuzita la feliĉo por ĉiam. Li frapis al cent pordoj, sed neniu malfermiĝis al li. Grandega sopiro pri feliĉo, pri gojo, pri amo vekigis en li kaj li etendis, kiel aliaj, la manojn al la ĉarmaj figuroj, sed neniu lasis sin kapti. Ekzistis nenia malestimo, nenia ĉagreno, nenia maljustaĵo, kiun li ne spertis. Ĉiu vermo sur la vojo opiniis havi la rajton, piki lin. Nenia voĉo levigis iam por lin defendi. La sensignifaj pikis lin, ĉar la grandaj lin ne protektis, kaj la grandaj, sataj, potencaj sidis sur siaj komfortaj seĝoj, lasis lin iri sur lia soleca vojo kaj trovis iatempe eĉ kiel peninde, levi ŝtonon kaj celi la suferanton kaj laciĝinton.

Li fariĝis griza, laca, dolorplena kaj kvieta. Li ĉesis fine batali. Li fermis sin en sia fiera soleco kaj diris al neniu, kiel terure li suferis pro sia profunda izolo. Nun restis en li varmega sopiro: sopiro pri ripozo, pri la morto. Je ĝi, kiu ĉion egaligas kaj ĉion silentigas, li ofte etendadis dezire la brakojn. Li ne timis ĝin. Por li la morto estis savanto.

Kaj kiam fine la maljuna poeto estis mortonta, kaj sentis la proksimon de l' amiko, de l' liberigonto, li ĉirkaŭrigardis sopire. Li volis vidi ĝin, la morton, por danki al ĝi, ke ĝi estis veninta, por diri al ĝi, ke li ĝin amas. Kaj jen! Li ekvidis la amikon.

Li staris eĉ lia lito: alta figuro, en nigraj vestoj kun nigraj flugiloj eĉ la ŝultroj, serioza kaj pala kaj bela.

»Jen mi estas«, diris la morto kaj etendis la palan manon je li. »Ne timu! Mi ne tuŝos vin tiel krude, kiel faris la vivo«.

La malsana poeto kaptis la palan manon de l' morto: »Mi ne timas vin. Kaj tuŝu min, kiel vi volas: pli multe min suferigi ol la vivo, vineniam povas.

Tiam li rimarkis, ke la morto ne estis sola. Ĉarma virina figuro de mirinda beleco, en blanka malpeza vesto, staris apud la morto.

»Kiu vi estas, ĉarma estaĵo?« demandis la mortanta poeto kvazaŭ blindigita. »Mi vin ne konas«.

»Jes vi min ne konas«, ŝi diris kaj larmoj ekfluis el ŝiaj belaj okuloj. »Via destino ne allasis min al vi! Ofte mi estis proksime de vi, ofte vi min alvokis. Sed via destino starigis sur mia vojo kaj neniam mi povis veni al vi, neniam vi povis alpreni min al la koro. Nun fine mi estas ĉe vi, nun, kiam vi mortas«.

»Kaj kiu vi estas?« demandis la mortanto ankoraŭ unufoje kaj observis sin seninterrompe. »Sajnas al mi, ke mi vidis vin en miaj songoj«.

»Mi estas la ĝojo«, ŝi diris kaj falis sur lian mizeran kuŝejon. »En viaj songoj mi estis ofte ĉe vi, en la maldormo neniam. Nur kun la morto mi povis alproksimiĝi al vi. Ili malenviis al vi nenian ĝojon krom tiu ĉi: la ĝojo morti«.

»La ĝojo!« Sopire eligis la poeto la vorton: »La ĝojo! Kiel agrable ĝi efikas! La morto klinis sin super li, ĉirkaŭprenis lin delikate per la brakoj. »Via unua kaj la lasta ĝojo, vi mizerulo, de l' destino notita: kvieta morto«.

La ĉarma virino genuis ĉe li, karesis liajn manojn: »Ili pilgrimos al via tombo, ili ornamos ĝin per floroj kaj laŭraj kronoj, ili honoros vin, kaj via nomo vivos plue neforgesita«.

La morto etendis super li la nigrajn flugilojn kaj premis lin pli forte al si. Nun ĝi kisis delikate, kompateme liajn okulojn, metis delikate kaj kompateme la manon sur lia koro. Kaj la okuloj rigidigis kaj la koro ĉesis bati. Sed sur la pala buŝo ludis gaja rideto kaj en la okuloj respegulis sin la bildo de ĝojo, kiu estis la lasta, kiun la mortanta poeto vidis

Esperantigis: *Stanislaw Rosenstock.*

FABLOJ.

de Milan Vukasović el Niš. Esperantigis *R. M. Ćupić*, Danilovgrad, Montenegroj.

Utila katino.

Katino kaptis iam muson. La muso petis ŝin, ke ŝi forlasu ĝin.

— Neniam! — diris la katino serioze, ĉar ci estas malutilfaremulo! — kaj ŝi ĝue formanĝis la muson.

La sekvontan tagon ŝi kaptis paruon. La paruo ankaŭ petis la katinon forlasi ĝin, ĉar ĝi multe utilas al la homoj.

— Pri tio mi jam aŭdis; sed mi estas pli utila! — finigis la katino mokece, kaj formanĝis ĝue ankaŭ la paruon.

FAJRERETOJ.

Donacu vian monon — sed pruntu neniam. Donaco faras nur nedankemulojn, sed pruntado ion ankoraŭ pli malbonan — malamikojn

Ĉiuj tiuj meritas sian malfeliĉon, kiuj ne povas utiligi per ĝi

Ne estas bone, kiam la edzino divenas ĉiujn dezirojn, de sia edzo, sed ankoraŭ pli malbone estas, kiam ŝi postulas, ke li divenu ĉiujn ŝiajn dezirojn.

Ordinare oni nur tiam diras: »Hol mi ekkonis bone la homaron!« kiam oni ekkonis ĝin de la malbona flanko.

Saĝa viro estas ĝojo de l' mondo, sed ofte turmento por liaj ĉirkaŭuloj.

Kiam oni ekkonas la vivon tiel, kiel la Dio ĝin kreis, oni ne povas alie fari, ol danki al Li, ke Li kreis ankaŭ la morton.

Esp. Akio.

DEK ORAJ REGULOJ POR KOMERCISTOJ.

1. Estu afabla kun l' aĉetanto apenaŭ li eniris, tiu estas la ĝusta momento por tio. — 2. Estu ĉiam tre ĝentila sed sincera sen afektemeco. Ĝentileco ludas grandan rolon je via sukceso — 3. Rideto — bonaj komercistoj scias ja tion — estas unu el la plej bonaj venkantoj. Montru, ke vi amas vian metion kaj — ridetu. — 4. Diru ĉiam la veron! Nenio estas pli forta ol tio. — 5. Neniam trompu vian

klienton, ĉar tio sin venĝos; anstataŭ pli grandan nombron de klientoj, vi akiros pli grandan nombron de homoj, kiuj kiel peston evitos vin. — 6. Konfido estas unu el la plej fortaj kondiĉoj por via sukceso. — 7. Ne disputu kun via kliento, la komercejo ne estas juĝejo. — 8. Ĉiun vian atenton turnu al tio, al kio ĝin turni deziras via kliento. Ne estu ŝparema en la elspezo por reklamo. — 9. En via metio vi devas esti tre lerta, sperta kaj alkutimita. — 10. Estu honesta, bona patrioto kaj bonfaranto tio estas la plej bona reklamo de viaj klientoj

Tradukis *Marko Koprivica*, komercisto.

HUMORAĴOJ.

Li devis ĉiam sen kontraŭeco vesti ĉiujn malnovajn vestojn demetitajn de sia patro. Sed unu tagon li subite ekploris.

— Kio mankas al ci filo? demandis lia delikata patrino. Ĉu ci estas batiginta?

— Ne! ekĝemis li. Sed paĉjo derazis hodiaŭ sian barbon, kaj nun eble mi devos porti lian malnovan ruĝetan barbon.

* * *

Distreco: — Ho! kara amikino, kiom da jaroj ni jam ne revidigis? Kaj kiel vi fartas? Mi aŭdis, ke vi estas edziniĝinta?

— Ankoraŭ ne, mi eĉ ne pensis pri ĉi tio

— Tiel — tiel —, kaj ĉu vi jam havas infanojn?

Esp. *Akio*.

M e m k o n s c i o. Leŭtnanto: Nu, fraŭlino Maria, kiel fartas via pli juna fraŭlino fratino?

Maria (14 jara): Mi dankas, ŝi estos ankaŭ tre beleta.

* * *

Ĉu vi kredas ankaŭ, sinjoro barono, ke edziĝintaj viroj pli longe vivas ol nedziĝintaj?

Ne, sinjorino, al ili ŝajnas nur tiel.

Esp. fino: *Antonio Jozić*.

DRUŝTVENE VIJESTI.

Druga glavna skupština »Društva hrvatskih esperantista bit ĉe dne 12. ožujka 1910. u 8 s. uveče u prostorijama svratišta Royal, Ilica 44 (dvorište desno). Dnevni red priopćit ćemo u pravo vrijeme u dnevnicima zagrebačkim. Pozivljemo članove naših društava i sve prijatelje Esperanta, da posjete naše skupštine, da uzmognu tamo doznati razvitak i djelovanje naših društava. — Poslije skupštine zabavno veče. — Ulaz slobodan.

Mjesečni sastanak i zabavno veče »Društva hrv. esperantista, i »Kluba hrv. akademičara esperantista«, na 12. veljače t. g. prošla je veoma lijepo i veselo, što imamo da zahvalimo našim agilnim akademičarima. Uz svirku, deklamaciju, pjevanje i ples teklo je vrijeme vanredno ugodno.

SOCIETAJ SCIIGOJ.

La dua ĉefkunsido de l' »Društvo hrvatskih esperantista okazos la 12 de Marto 1910. je la 8a vespere en la lokaloj de »Hotelo Royal« Ilica 44. La tagordoj estos rektatempe anoncataj en la ĵurnaloj Zagrebaj. La anoj de niaj societoj kaj ĉiuj amikoj de Esperanto estas invitataj, ke ili ĉeestu al niaj ĉefkunsidoj, por ke ili ekkonatiĝu kun la disvolvado kaj agado de niaj societoj — Post la kunsidoj amuziga vespero. — Eniro senpaga.

La monata kunveno kaj amuziga vespero de l' »Društvo hrvatskih esperantista« kaj de la »Kroata akademio esperantista Societo«, okazinta la 12an de Februaro 1910. trapasis bele kaj tre ĝoje dank al niaj agemaj akademianoj. La muziko, deklamoj, kantado kaj dancado pasigis la tempon tre agrable.

U prvome redu spominjemo krasno izvedenu deklamaciju Zamenhofove: »La vojo« našega nadobudnoga 11 godišnjega esperantista Stjepana Jakovljevića, koja je bila nagrađena burnim pljeskom mnogobrojnih slušatelja. Akademikari g. Badalić i Krajcer sastaviše i ispjevaše nekoliko izvrsnih vrlo zgodnih kupleta o Esperantu, koji su izazvali gromki smjeh. Akademikar i vrsni esperantski pisac g. Iv. Stalcer esperantizirao je zgodnu humorističku pjesmu: »O mus!« čije je čitanje opet povećalo dobru volju općinstva. Miloglasno pjevanje poznatoga nam vrsnoga pjevača g. Matića (Nokta poemo) i g. Mahnić pak krasno sviranje na glasoviru g. akademikara Zvezdića i g. Štrige, našega »slijepoga Branka« ushitilo je prisutne.

Od lijepih nazdravica izrečenih tom zgodom napominjemo samo onaj g. akademikara Badalića, predsjednika, K. H. A. E., u kojoj je srdačnim riječima pozdravio našega odličnoga gosta, Poljaka esperantista g. Rosenstocka u ime obiju naših društva. Kad se je g. Rosenstock prekrasnim riječima zahvalio govorniku, slušali su upravo napeto svi prisutni njegov prekrasni esperantski govor, u kojem je istaknuo simpatiju i ljubav Poljaka napram Hrvatima i korist našega Esperanta za Slavene.

Zaista će ovo veče ostati svima u ugodnoj uspomeni.

Novi esperantski tečaj počinje 2. ožujka 1910 u 8 sati uveče u Kačićevoj ulici 21.

MOLBA.

Budući da se i među nekim našim članovima povelja o tom nova akcija, da se i jedan član naših esp društva izašalje na I međunarodni kongres katolika esperantista, to se ovim obraćamo i na ostale nečlanove katolike i prijatelje Esperanta, da nas u ovom nastojanju bilo kakovim prinosom podupru. Osobite se stavlja ova molba na srce našem katoličkom svećenstvu, jer ono sigurno najbolje uviđa, od kolikoga je zamašaja esp pokret baš za napredak katolicizma. Svaki, pa i najmanji prinos prima se zahvalno.

BIBLIOGRAFIO.

L'ESPERANTO ET LES LANGUES NATIONALES par M. le Général Sébert, Membre de l'institut. Paris, Office central espérantiste.

Ni rekomendas al niaj france sciantaj samnacionoj ĉi tiun bonegan broŝuron, en kiu la aŭtoro kolektis multajn argumentojn, per kiuj oni povas pruvi, ke propagandante Esperanton oni ne nur ne malhelpas la disvastigon de l'nacia lingvo, sed eĉ apogas kaj helpas ĝin.

En unua vico ni mencias la belegan deklamon de la Zamenhofa »La vojo«, dirita de 11 jara esperantisto Stjepan Jakovljević, kiun rekompencis brua aplaŭdo de l'aŭdintoj La Akademianoj Sroj Badalić kaj Krajcer verkiskelke da bonegaj kupletoj pri Esperanto, kiuj kaŭzis bruan ridadon ĉe l'publiko. La akademiano kaj bonega verkisto esperanta Sroj I. Stalcer esperantigis la humorajan poemon »Pri la muŝo«, kies legado nur pligrandigis la bonhumoron de la publiko. La belsona kantado de nia konata kantisto Sroj Matić (Nokta poemo) kaj Sroj Mahnić plue la belega ludado sur la piano de Sroj akademiano Zvezdić kaj de Sroj Ŝtriga, »nia blinda Branko«, tre plaĉis al la ĉeestintoj.

El belaj toastoj diritaj tiuokaze ni citas nur tiu de l'akademiano Sroj Badalić, prezidanto de la K. A. E. S., en kiu li per koregaj vortoj salutis en la nomo de ambaŭ societoj nian eminentan gaston Sron Rosenstock Kiam Sroj Rosenstock dankis al la antaŭparolinto, ĉiuj ĉeestintoj atentegis aŭskultis la belegan esperantan paroladon, en kiu li priparolis la simpation kaj amon de Poloj al Kroatoj, kaj la utilecon de nia Esperanto por la Slavoj.

Vere, tiu vespero restos al ĉiuj eu agrabla rememoro.

La nova esperanta kurso komenciĝas la 2-an de Marto 1910. je la 8 a vespera en Kačićeva ulica 21., la etaĝo.

L'ESPERANTO RÉPONSE A DES CRITIQUES. Camille Aymonier, Paris. Édition de la Revue du Mois. Kun granda plezuro ni legis ĉi tiun bonegan broŝuron pruvantan, ke lingvon vivantan, kia Esperanto jam estas, oni ne povas laŭvole korekti kaj »plibonigi«. Ni ja vidas el multaj ekzemploj de Esperanto reformita, plibonigita kaj kiel oni ja nomas tiujn sennombrajn Esperant-idojn, la plibonigoj estas eble teorie bonaj, sed je praktika vidpunkto ofte neuzebaj. Tial ni devas lasi, ke esperanto nature evoluciu, sub la kontrolo de ĝia »Lingva komitato«.

BELGA ADRESARO ESPERANTISTA 1910. Eldono de »Centra esperantista belga oficejo« (Oscar van Schoor kaj Frans Schoofs, 20, Vondelstraat, Antwerpen. Prezo: F. 0 50 (eksterlande f. 0 75 Sd 30). Redakcio de la adresaro: 49, Kleine Beerstraat, Antwerpen. Ni rekomendas ĉi tiun belan libreton, kiu enhavas krom la adresaro de esperantistoj, esperantaj grupoj kaj oficejoj en Belgujo, praktikan kalendaron, sciigojn pri la »Belga Liga Esperantista«, kaj »Historion pri Esperanto en Belglando« de nia eminenta samideano S-ro Oscar van Schoor.

Novaj gazetoj.

UNIVERSO-internacia revuo por la belo redaktita de Albert Schramm, Dresden kun profesoro D-ro Siegfried Lederer, Prag. Eldonejo: Heckners Verlag, Wolfenbüttel, (Germanujo) Abonprezo. Ĉiu esperantisto devis bedaŭri la malaperon de la belega, amuza kaj instrua gazeto »La Bela Mondo«. Sed ĝoje ni eksalutis la aperon de la dirita gazeto en nova formo, kaj sub nova nomo: Universo. Ĝi estas gazeto tre lukse presita, kun tre interesa enhavo kaj belegaj ilustracioj. Krom tio ĉiu kajero enhavas belan artan aldonon.

STUDENTO unua internacia organo de studentoj kun aldonon en steno-grafio Aoro. Jara abono: 1. Sm. Redaktoro I. Kuthan, Red. kaj adm. Praha II. Ječna ul. 24 Bohemujo. Ni varme rekomendas al ĉiuj niaj studentoj, ke ili apogu tiun belan entreprenon abonante tiun ĉi beletan gazeton.

LA DUONMONATA, tutmonda revuo Esperanta, alterne ilustrata, por la vivo de l'Esperantistaro sur ĉiuj kampoj de la homa spirito Aperas regule la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato. Redaktoro Karl Steier. Eldonisto Johannes Heyn, Leipzig (Germanujo), Thomasring 6, Jara abonprezo M. 3 60.

Tiu ĉi nova gazeto celas esti tutmonda informilo pri la publika vivo de la nacioj, pri ĉiuj tutmondaj okazintaĵoj de ĝenerala intereso. Per la konstanta tutmonda kroniko pri la esperanta movado ĝi informas la gelegantojn pri la progresoj de l' Esperanto. Per sia internacia kunlaborantaro, konsistanta ĉefe el »Lingvo Komitatoj«, ĝi garantias purecon kaj belecon de l' stilo.

RUND UM DIE WELT (Ĉirkaŭ la mondo). Eine Zeitschrift für Esperantisten und solche die es werden wollen. Redaktita de prof. Siegfried Lederer, Prag—Weinberge, Nerudagasse 3. Kun konstanta kunlaborado de D-ro Schramm. Ni rekomendas al ĉiuj germane sciantaj samideanoj, kiuj deziras precize esti informataj je la esperanta movado en la tuta mondo, ĉi tiun tre interesan gazeton.

JUNECO. Oficiala organo de la franca federacio de la junaj esperantistoj. Jen nova sukceso de l'esperanta movado inter junuloj Juneco, tre simpatia gazeto, al kiu sukcesu kunligi ĉiujn niajn junajn gesamideanojn. Ni ĝojas ke ĝi forlasis la idsimilajn sufiksojn, kiujn ni trovis en la 1-a N-ro.

KOLOMBIA STELO. Unua esperanta ĵurnalo en Kolombio. Oficiala organo de Esperantista Unuiĝo. Cucuta, Colombia-S. A. Tre simpatia gazeto redaktita de la komitato de la Societo »Kolombia Stelo«. Ni deziras al nia Kolombia kolego tre bonan sukceson kaj feliĉan estontecon!

LA AUSTRALIA VERDA STELO. Red. George Collingridge, Hornsby, N. S. W. Aŭstralia. Beleta gazeto angla — esperanta kun belaj mandesegnaĵoj, kaj ornamartaj skizoj. Tiu gazeto interesa kaj instrua devas plaĉi al ĉiu leganto.

Neke važne upute za one koji žele posjetiti taj kongres:

Loĝa. — La Loka Komitato de la Kongreso zorgos por trovi, en la ĉirkaŭajoj de la Kongresdomo (apud la belegaj ĝardenoj de Luxembourg) taŭgajn hotelojn. Sufiĉas, ke ĉiu kongresonto, mendante sian kongreskarton diru kian sumon li deziras elspezi por sia ĉiutaga vivado. (La minimuma sumo estas 6 frankojn por ĉiu tago). Komunaj manĝoj, dum kiuj oni parolos Esperante, estos ankaŭ aranĝitaj.

Afiŝoj. — Afiŝoj en Esperanto pri la kongreso estos eldonitaj, kaj senditaj po unu ekzemplero al ĉiu kongresonto, kiu pagis sian karton. Pluaj ekzempleroj estos senditaj afrankite, kontraŭ fr. 0,25 por ĉiu afiŝo, al kiuj ilin mendos.

Por la komitato: La Sekretario de la Kongreso, Cl. Colas.

Grava sciigo. — Ĉiuj francaj fervojaj kompanioj konsentis rabaton da 50% (duon-tarifo) por la partoprenantoj de nia Kongreso.

Tiu duon-tarifo valoros de la 27-a de Marto ĝis la 7-a de Aprilo 1910.

La kondiĉoj por ĝui la rabaton estas jenaj:

1-e Pagi antaŭ la 10-a de Marto al la kasistino de la Kongreso (S-ino de Ménil, 46, boul. Magenta, Paris) krom la kongreskarton (fr. 2,50 aŭ 1 Sm) kotizajon da for. 1,25 por diversaj elspezoj rilataj al tiu rabato; 2-e Sendi, antaŭ la sama dato, la jenajn sciigojn: a) per kia franca stacio oni eniros en Francujon, se oni venas el fremdlando; b) tra kia linio oni deziras veturi Parizon. Oni povas tuzi, por esti pli klara la jenan formulon: Mi deziras partopreni je la Kongreso, kaj petas, ke la Komitato sendu al mi la rabatfoliojn, kiuj permesos al mi veturi Parizon po duon-tarifo. Mi sendas al la kasistino fr. 3,75 (2,50 kaj 1,25) por rajti la diritan rabaton. Mia veturado sur la franca teritorio komencos per la stacio de... kaj mi deziras iri Parizon tra...

Rimarkoj. — a) Tiuj, kiuj jam pagis la kongreskarton nur bezonas aldoni pluan kotizajon da fr. 1,25, sendante da suprediritajn sciigojn, b) la lasta templimo por peto de rabatfolioj estas la 10-a de Marto, post tiu dato ni ne plu respondas pri konsento de rabatoj.

Uzo de rabatfolio. Por ĝui la duontarifon ĉiu kongresano nur bezonas prezenti la rabatfolion ĉe la deira stacio en franca teritorio. La Hispanoj, kaj ĉiuj Francoj, kiuj loĝas en la regionoj dependaj de la kompanio »Midi« ricevos du rabatfoliojn: unu por veturi per la fervojoj de la dirita kompanio, alian por veturi per alia kompanio ĝis Parizo. Pro tio, ili nepre devas sciigi ĉu ili trapasos per Bordeaux, Agen, Toulouse eŭ Cette. (La Hispanoj nepre devas ankaŭ diri ĉu ili eniros Francujon per Hendaye (Irŭn) aŭ Cerbère (Port-Bou.)

Ni donos en la Marta numero de »Espero Katolika« pluajn sciigojn pri Parizo, kaj detalojn pri nia granda ĉefurbo. De nun ni povas certigi, ke ni kreos »Akceptejon« kie povos, je ilia alveno en Parizo, sin kondukigi la kongresanoj. Tio oni donos al ili necesajn sciigojn pri hoteloj, manĝaĵoj, k. t. p.

La laboro de la Kongreso.

La temoj pritraktotaj en nia Kongreso estas jenaj:

1-e La Idealo Katolika kaj Esperanto: a) Unueco de la Eklezio; b) Paco internacia; c) Justeco kaj Moralo kristanaj en la societo.

2-e Por servi la Eklezion: a) Esperanto, ilo de informo (enketo pri situacio de la Eklezio en diversaj landoj; b) Esperanto, ilo de defendo (organizo de la Tutmonda Katolika Uniĝo Esperantista; ilo de propagando religia (internaciaj kongresoj.)

Ĉiuj, kiuj volas doni informojn pri tiuj traktotaj temoj devas ilin sendi, antaŭ la 15-a de Marto, al la ĝenerala sekretario S-ro Cl. Colas, 10, rue Beranger, Paris, kiu transdonos ilin al la taŭgaj raportontoj. Ĉiuj kongresanoj povos partopreni en la diskutado.

MALGRANDA ANONCARO.

(Ĉiufoja presigo de tia anonco kostas 60 helerojn = 25 sd.).

S^{ro} Stanislav Rosenstock, Zagreb, Gunduliĉeva ul. 35. serĉas »Kroatan Esperantiston«, No 2a, jarkolekto 1909. Oni sendu proponojn.

S^{ro} Đuro Vojkoviĉ, apotekisto, Klanjec, Zagorje, Kroatujo, deziras kolrespondandi per leteroj aŭ ilustritaj poŝtkartoj kun geesperantistoj el ĉiuj landoj, precipe el Bosnujo, sia patrujo

Gramatika Esperanta napisala Danica Bedeković - Pobjenička. Potpuna slovnica s jasnom i lako shvatljivom uputom u Esperanto uz mnoge primjere, vježbe i esperantsko ŝtivo u pjesmi i prozi — Cijena broŝiranoj K 3.—, ukusno vezanoj K 4.50.

Esper. - hrvatski rječnik od Danice Bedeković-Pobjeničke. — Najpotpuniji od sviju dosadašnjih esperantskih rječnika. — Cijena K 4.—, ukusno uvezanome K 5.—.
Navedene knjige dobivaju se u knjižari i „esperanto nakladi“ JOSIP SOKOL, Zagreb, Marovska ulica 21.

Esperantski znakovi (zelená zvezdá) za gospode (igle) i gospodu (puceta) dobivaju se u našem uredništvu komad po 50 filira

Meblofabrikejo kaj ateliero por dekoracioj

BOTHE I EHRMANN

LIVERANTOJ DE LA IMP. kaj REĜA KORTEGO

Zagreb Deponejo kaj ateliero llica 38 fabrikejo llica 45 Wien deponejo kaj ateliero Carlsplatz 2 fabrikejo V. Schlossgasse 10

Vaporforta meblofabrikejo.

Propraj produktaĵoj

solidaj

MEBLOJ

por simpla loĝejaranĝo, plena edziĝa doto kaj »viloj«, por kafejoj, restoracioj kaj oficejoj, kiel ankaŭ tapiŝigo de ĉiuspecaj lokaloj, lamberi-ellaborado de teraĵoj kaj mesingaj mebloj, kurtenoj, matracoj, tapiŝoj, linoleumo, speguloj, bildoj, infanveturiloj k. t. p.

Ilustritaj katalogoj, fotografiaĵoj kaj precipe ellaboritaj planoj kaj kalkuladoj estas je deziro afrankite kaj senpage sendataj.

Pagadfaciliĝoj sen pligrandigo de prezoj.